

Novaj samideanoj

finis la bazan korespondan kurson dum lastaj monatoj:

Novák Ján, profesoro, gymnasium Čalovo

Čermáková Dana, 1957, 33842 Hrádek u Rokycan, N.Huť 74.

Ni deziras al ili feliĉan ekpaŝon

en la pormovada vivo de nia verda familio!

Noví samideáni

skončili základní korespondentní kurs v posledních měsících:

Přejeme jim šťastný start v životě hnutí naší zelené rodiny!

Seminario por frekventantoj de la korespondaj kursoj kaj aliaj komencantoj okazos 31.X. - 2.XI. 1980 en Valtice apud Břeclav. Loĝado en hoteloj (tranokto = 50 Kčs), aliĝkoto 40 Kčs.

Programo: interkonatiĝo de partoprenantoj kaj instruistoj de la korespondaj kursoj, trarigado de kastelo kaj ĉirkaŭaĵo, kultura programo, vendado de esp.literaturo, gazetoj ktp; socia vespero kun danco; diskuto, informoj. Limdato por aliĝo 10. X.80. Petu tuj aliĝilon ĉe nia Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 11000 Praha 1, Jílská 10, (Nombro limigita-150).

Seminář pro frekventanty písemných kursů a jiné začátečníky bude se konat 31. října – 2.XI. 80 ve Valticích u Břeclavě. Ubytování v hotelích (nocleh = 50 Kčs), přihlašovací poplatek 40 Kčs. Program: seznámení účastníků a učitelů korespondentních kursů; prohlídka zámku a okolí, kulturní program; prodej esp. literatury a časopisů; společenský večer s tancem; diskuze, informace. Termín přihlášek do 10.X. Žádejte přihlášku u našeho Českého esperantského svazu, 11000 Praha 1, Jílská 10 (Omezený počet-150).

KONKURSO POR ĈIUJ LEGANTOJ

de la pasinta numero de VF: Venis entute 12 leteroj kun tradukaĵoj, kiuj atestas pri alta lingva nivelo de niaj legantoj. Post fina teksado la rezulto estos proklamita en la estonta numero.

SOUTĚŽ PRO VŠECHNY ČTENÁŘE

minulého čísla VF: Došlo celkem 12 dopisů s překlady, které svědčí o vysoké jazykové úrovni našich čtenářů. Po konečném hodnocení bude výsledek vyhlášen v příštím čísle.

Turismaj tagoj en Žilina okazis inter 20.-24.8.80. Ĉirkaŭ 30 partoprenintoj (el ĈSSR, H, Pl, GDR, Italio) kunfandiĝis dum 4 ekskursoj en tre bonan kolektivon, kies travivaĵoj fariĝis neforgeseblaj. La turismaj tagoj havas jam sian tradicion. Estontjare ili estos aranĝataj dum la tuta semajno apud tri tagoj de sciencoteknika seminario kaj renkontiĝo de esperantistaj familioj kun infanoj parolantaj esperanton. La renkontiĝo kaj sciencoteknika seminario estas jam nun preparataj por aŭgusto 1981. Jam komence de la jaro petu detalajn informojn kaj aliĝilon.

Turistické dny v Žilině byly 20.-24.8.80. Okolo 30 účastníků (z ČSSR, H, Pl, NDR, Itálie) splynuly během 4 výletů v dobrý kolektiv, jehož zážitky staly se nezapomenutelnými. Turistické dny mají už svou tradici. Příštího roku bude uspořádán celý týden vedle 3 dnů vědecké-technického semináře a setkání esperantských rodin s dětmi, mluvícími Esperanto. Setkání s vědecko-technický seminář jsou už dnes připravovány na srpen 1981. Už začátkem roku 1981 si vyžádejte podrobné informace a přihlášku.

Seminario pri apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko – Ústí n.L. 29.8.-31.8.1980.

Ĝi estis tre grava renkontiĝo de esperantistoj, kiu klare montris dum tritaga agado la uzeblecon de Esperanto por moderna terminologio scienca kaj teĥnika. Jen la titoloj de la prelegoj:

Seminář o využití Esperanta ve vědě a technice – Ústí nL 29.-31.8.1980 byl důležitým setkáním esperantistů, které jasně prokázalo během třídního jednání možnost využití E-a pro moderní terminologii vědeckou a technickou. Tituly přednášek:

Malfermo (zahájení) de seminario, salutoj.

Prelegoj de la temogrupo A: La vivomedio (životní prostředí)

RNDr Jaromír Jermář: Socialaj aspektoj de ekologia problemoj.

doc RNDR Vlastimil Novobilský CSc: Eduko al zorgo pri la vivomedio.

Mudr. L.Tichý: La vivomedio kaj la sano. - Inĝ A.Lukács: Pri la ŝanĝado de la vivomedio en Hungario. - Inĝ. J.Kříž: Problemoj de la protektado de la atmosfero en ĈSSR. - Inĝ.Hálek + Inĝ.

Dubišar: Kunekzistado de la urbo kaj ĥemio. - Inĝ. H.Landsperský: Nuklea industrio kaj la vivomedio. - Prof.Dro.O.Haszpra Dr Sc: Regionaj *efikoj al* la grundakvo *far* la *akvonodaro*

Gabčíkovo- Nagymaros. - MUDr Josef Černý: Ekologia kondiĉoj kaj la vivomedio en *Subercmontaro* en la distrikto Most. - Inĝ.Z.Pluhař: Agrohemiaĵoj kaj la vivomedio. - La kromefikoj

de la industriaj sterkaĵoj (hnojiva). La kromefikoj (vedlejší účinky) de la industriaj *bioicidoj*. - Dro Arpád Mathé: Interdependoj (Mezivztahy) de la medioprotektado kaj ĥemio teĥnologio – Dro Inĝ

Ludvík Fritsch: Problemoj de la senforfala (bezodpadové) paperindustria teĥnologio.

Prelegoj de la temogrupo B: Problemoj de la faka lingvo kaj traduko: Dro Detlev Blanke:

Lingvoplanado en planlingvo. La esperantologio, ĉu priskriba aŭ preskriba scienco. Inĝ Jan Werner: Faklingvaj principoj de vorta elekto kaj formigo (tvoření). - Inĝ R.Partecke: Temo kaj amplekso

(rozsah) de mikroelektronika faktvortlisto (seznam odborných slov) kiel parto de elektronika fakvortaro. - Inĝ.Z.Pluhař: Konkiza (stručná) historio de la nomenklaturaj en ĥemio. Problemoj de

la sistema ĥemia nomenklaturaj en la Internacia lingvo. - RNDr J.Kavka CSc: La fenomeno Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. - JUDr K.Traxler: Problemo de la jura

terminologio en Esperanto. - S.Révész: Faktraduka agado de la Budapeŝta Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj. - Karel Píč: Teĥnikaj fundamentoj de Esperanto (lingva ekonomio kaj lingva ordo). Dro Arpád Mathé: ĥemiaj fakterminoj en Esperanto. - MUDr Josef Černý: Stato de la

Esperanta-ĉeĥa vortaro. - Diskutoj.

Kunsidoj de la fakaj grupoj: 1.Terminologio, lingvistiko. - 2.Ekologio, vivomedio. - 3.Komputiko, matematiko. - 4.Jura terminologio. - 5.Ĥemio. - 6.Elektroteĥniko. - 7.Maŝinfako. - 8.Aeronaŭtiko. -

9.Akvomastromado, hidraŭliko.-

Ĉiu partopreninto ricevis simposion SAEST 1980 kun koncizaj aŭtoreferajoj. Tiu ĉi broĵuro (104 paĝoj) estas havebla (37.-Kĉs, ĈEA Praha)

Organizado de la seminario antaŭ la kongreso kaj dum la kongreso estis senriproĉa, same kiel la loĝado en la studenta hejmo. Fine de la kunveno estis anoncita la programo por la estontjara SAEST en Žilina.

Kulturaj novaĵoj: Dum la seminario solena kulturvespero en Ústí la 30an de aŭgusto 1980 okazis unua publika prezentado de la poemaro de Jiří Kořínek „Skizoj el Usedom“ deklamita de s-anino Seemanová kun eksterordinara sentemo kaj esprimkapablo de la lingva kultureco de nia elstara esperanta poeto. S-ano Miroslav Smyčka kaj Jana Scholzeová, solistoj de la ŝtata opero en Ústí prezentis operariojn kaj kantojn de famaj komponistoj. Sentplena prezentado de la plej konataj melodioj far de la kulturita kaj formigkapabla baritono de Smyčka kaj en delikatimpresivaj kaj en hero-fortsonantaj partoj provokis kaj plorsenton kaj gajon, eĉ frostsenton sur dorso de la priravitaj aŭskultantoj. Ĝi estis akcentita ankoraŭ per eksterordinara aktora kapablo de nia amata kantisto. Eva Seemanová krom poemaro de Kořínek ebligis al la partoprenintoj pluan neforgeseblan travivaĵon ĉeesti la ĝeneral-provon de la nova plua rila teatraĵo far de ĉeestanta aŭtoro Valda Vinař: Ĉe la rando de la abismo, kiu estas sentplena elkrio virina kontraŭmilita, akcentita de la aktorina majstreca prezentado. Impreema aŭskultanto, preparita kaj antaŭagordita per influplena trarigardado de ĉi tie prezentitaj libroj pri Hiroŝimo eksterordinare perceptis la prezentadon de la mizeroplena patrino, kiu perdis sian infanon, far de ES, kiu profesia aktorina majstreco bildigis ĉiujn trajtojn de la personigita ina tragedio. Sincera dankon de la E-aŭskultantaro esprimiĝis per longa aplaŭdo.

LETERO DE LA LEGANTO. Karaj gesamideanoj! Mi ankoraŭ bone rememoras la lastajn momentojn de la skriba kurso. Kiel nova kaj malsperta esperantisto mi ne sciis kiel perfektigi. En tiu tempo oni plej ofte aŭdas nur plendojn, ke mankas kontaktoj kaj tiel plu. Jen mi konsilas: aŭskultadi Esperantlingvajn disaŭdigojn (vysílání)! Ĝustan prononcon; interesaj programojn oni povas eĉ surbendigi (nahrát na pásek) kaj reaŭskulti! Precipe la aŭskultado de pola kaj svisa radio tre helpis min. Petu presitajn informojn ekzemple de: Pola radio, Esperanto redakcio 00-950 Warszawa, Pollando kaj Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH 3000 Bern 15, Svislando. Mi kore deziras al vi bonan aŭdeblecon (slyšitelnost) kaj agrablajn travivaĵojn (zážitky) ĉe radioriceviloj (přijímačů). Fr. Stejskal, Osek u Duchcova.

LINGVA ANGULETO—Karel Blažek. KIEL DIRI ? (Kompilite pliparte laŭ la vortaro ĉeĥa-esperanta de la fratoj Filip)

Absolvovat školu = fini, trapasi lernejon. Uložit „ad acta“ = enarkivi ĝi, flankenmeti. Odešel, aniž pozdravil = li foriris eĉ nesalutinte, li foriris sen saluto. Automat požární = brulanonca aŭtomato. Vypadat až běda = aspekti kompatinde. Plakati až běda = plori korŝire. Slepá bába (hra) = blindludo, blindpalpa ludo. Svíčková bába = kandelvendistino. Babí léto = finsomera araneaĵo, komencaŭtuna araneaĵo. Bačkora (o člověku) = malaktivulo, hejmsidulo, senkuraĝulo. Bez ladu a skladu = senorde, intermiksita, ĥaose. Běží o život = la vivo estas riskata. Seděti na bobku = kaŭre sidi. Sednout si na bobek = sidkaŭriĝi. Bručet (být zavřen) = esti karcerita, troviĝi en karcerio. Budovatelské úsilí = penado realigi socialismon, penado al socialismo. Býti v bryndě = malbonstati, esti en malbona situacio. Nazdařbůh = hazardfide, hazardprove. Cenit zuby = montri, vidigi dentojn. Co na tom? = negrave. Ĉu grava? Dočkat = ĉasu = ĝisatendi. Čelit všemi silami = kontraŭstari per ĉiuj fortoj. Čelit únavě = rezisti al la laciĝo. Zpívat dále = daŭrigi vojon. Dejme tomu = Ni supozu. Děj se do děj = okazu kio ajn ĉiuokaze.

(daŭrigota – na pokračování)

Korespondi deziras:

(Mallongiloj-zkratky: bk=bildkartoj; ĉl=ĉiu lando; ĉt=ĉiu temo; d=deziras; f=fraŭlo; f-ino=fraŭlino; ft=fotografajoj; gd=gramofondiskoj; iŝ=interŝanĝas; its=interesiĝas; j=jaroj; kol=kolektas; kor = korespondi; lern=lernantoj; lern-ino=lernantino; l=leteroj; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; s-ro=sinjoro; s-ino=sinjorino; tm=tutmonde).

En Gray, grava loko de la franca movado, kun Nacia Franca Esperanto-Muzeo, 5 lern-oj kaj 8 lern-inoj, ĉirkaŭ 30j, dez.kor pri ĉt. Skribu al „Esperanto-Muzeo, 67 Fg Perrieres, F-70100 Gray“, kiu disdonos adresojn laŭ ricevitaj proponoj k. Deziroj. Respondo garantiata kun turisma prospekto.

Rosica Dimitrova, Str.C.Boris I, 21 vhB ap.16, 52 Svištov, f-ino 22, BG d kor pri amikeco

Marijka Siderova, Blok Montaj 1, vhG ap 4, 5500 Loveĉ, s-ino 51j, BG d kor pri amikeco.

20-jarulo d kor tm pri landoj, sporto, lokomotivoj, aeroplanoj kaj aliaj temoj. Volonte mi itŝ pm kaj bk. Ralph Sterl, Agnesstr. 37, D-8400 Regensburg, FR Germanio.

Aleksandr Belov, str. Svedskaja 24-4, SU-314029 Poltava, Sovetunio 28j inĝeniero d kor kun samaĝaj amikoj alialandaj.

Iovko Borisov Rahev, Strate Perelik N 7, Assenovgrad 4230, knabo 14j *USSR* kolektas bk, pm, gazetojn.

Senpagan ekzempleron de turisma revuo La Migranto petu ĉe Erna Döring, poŝtfako 225, CH-4003, Basel, Svislando.

Polja Kalĉeva, Ch.Dimitr.70, 5200 Pavlikeni, knabino, pri amikeco. BG

Mehmet Telyakar, Aydmlik sok n-ro 23, Ortaköv-Istambul, Turkio, d kor kaj itŝ pm-

Hervé Daqŭst, 405 Delamontagne, Rouyn, Québec/Kanado J9X518 serĉas materialon por instrui Esperanton.

Zubsberg Ren, Kehta-Jarve Kivi 5-57, 202400 Estonio, Sovetunio, 31j, kol insignojn, kor pri sporto.

Heleno Gomes, 11100 Navic cidade de Belém, SANTOS-Sao Paulo-Brasil, Conan-Santos Rua Joao Pessoa 277, Brazilo-22j studento d kor kun gejunuloj pri itŝ de libroj, ft, poŝtkartoj kaj aliaj.

Gekursanoj deziras korespondi pri diversaj temoj: Alfred Hoenig, 39j, 7050 Leipzig, 7010 Bergstr.9 – Margit KUNZE (23j s-ino), 7010 Leipzig, Käthe Kollwitz Str.115; - *Manfred* KUNZE, 35j, 7010 Leipzig, Käthe Kollwitz Str.115; - Peter Thom, 17j, 7152 Böhlitz-Ebrenberg, Karl-Marx Str 51; - Margita HILBERT, 21j f-ino, 7050 Leipzig, Hildegard Str 28; Monika Groh, 27j, s-ino, 7010 Leipzig Kollonadenstr. 18; - Barbara Leipert, 21j f-ino, 7050 Leipzig, Reclamstr.1; Familio Pfeifer, 3 personoj pri arto k. Muziko, kristana fam, 7022 Leipzig, Marbachstr.6 - Ĉiuj el Germana Demokratia respubliko.

Krystyna Sitnik, ul. Kralowej Jadwigi 8b/9, PL 63-400, Ostrów *Wlkp* 19j, studentino de altlernejo por instruistoj, d kor tm.

S-ro Maki-Tosihoro, Miyuki-tyó, 4-23 Ŝizunaj, 656 *Hokkaido*, Japanio d kor pri lokomotivoj kaj itŝ pejzaĵ-ft.

Ben Parkinson, Pasaje Lepanto, 6, 40, 3B Córdoba, Hispanio, tel. 957-237899, angla intruisto, konstante loĝanta en Córdoba, proponas senpagan loĝadon kun kuireblecoj al esperantistoj dum 1-4 semajnoj por ekzerci la lingvon.

József Zónaj, H-6400 Kiskunhalas, Allomás u.2, Hungario, 40j inĝeniero kun edzino, d kor pri fervojo, interŝanĝvizito

Imre Szöcs, 4100 Miercurea Ciuc, Căminul Nef/I.T.M.C./str.Sourtă n-ro 19, Jud.Harĝita, Rumanio, d kor tm ĉt.

20-40 jaroj geklubanoj d kor kun ĉl. Ĝemeligo inter kluboj estas dezirata. Skribu al Józef Zonai, H-6400 KISKUNHALAS, Allomás u.2, Hung.

Letervespero realigota en decembro 1980. Sendu 1 poŝtkartojn, esperantaĵojn: librojn, prospektojn, broŝurojn, revuojn, ktp. Dek libropremioj por la plej bonaj sendaĵoj. Esperanto-Lernejo, Casilla de Coreo 278, RA-2000 Rosario, Argentino. Respondo garantiata.

Irana komencanto Ali Reza Kargarpur, Kakh Andishe Esperanto-Center, Kh.Qhazvin, Karaj, Irano d kor tm pri ĉt.

Marijka Siderova, BG—5500 Lovec, Blok „Montaj“-1, vh.G,ap.4 Bulgario d kor ĉt itŝ E-librojn, E-gramofondiskojn, bankbiletojn, pm, bk.

Jivka Petrova, BG-8445 Prilep, Burgaski, 9-lern-ino kun samaĝuloj.

Hristov Kolev, Genĉo, vilaĝo Goljamo Drjanovo, distr. Starozagorski, 21j, pri kulturo, naciaj kutimoj

Ivanova Ivanka, BG-8635 vil.Haĝi Dimitrovo, okr.Jambolski, 20j, bankoficistino ĉt

Veli Hämäläinen, SF-2 33230 Tampera 23, Amurinkuja 20 A 9, Finnlando 40j teknikisto d kor kun samfakuloj el aŭtobusa fabriko.

Maria Anastasiadu, odos Ipokratus 43, ATENO, Greklando pri ĉt, f-ino

Elpis Russu, f-ino, odos Aĥileos Kiru 5961, Neo Psiĥiko, Ateno, Greklando pri ĉt, ĉt

Pegi Kornaraki, odos Itilonos 4, Ateno 504, Greklando, f-ino, ĉt

Angeliki LUKOVITU N.N.A, f-ino, odos Dinokratus 70, Mazarlion, ATENO, Greklando pri ĉt.

Mary Platon, f-ino, odos Alex.Dusmani ST.T.817-Patissia, ATENO, Greklando, pri ĉt.

Sofia KONIOPULU, f-ino, 401 T.S.N.A.,B.S.T. 902, ATENO, Greklando ĉt.

Kaiti Daskalaki, odos Prussis 23, Nea Smirni, ATENO, Greklando, ĉt, f-ino

Nina Skardiaku, f-ino, odos Nikopoleos 9 (Aĥarnon), ATENO, Greklando ĉt.

Anastazia KONIOPULU, f-ino, N.N.A., odos Dinokratus 70, Marazlion, ATENO Greklando, ĉt.

Matilda PARASKEVÁ, s-ino, Jásu 3, Nea Maditos, Nea Filadelfia, ATENO, Greklando, pri ĉt.

S-ino Peritsopulu, Odos Krisis 42, T.T.809, ATENO, Greklando, s-ino, ĉt

Tamás SZARKA, H-8001, SZEKESFEHERVÁR, pf.182/K, Hungario, pri klasika muziko kaj ĵazo.

Helena Prpiĉ, YU-51000 Rijeka, Sibenska 7, Jugoslavio, 14j ler-ino, ĉt

Maja VERDONIK, Zdravka Kuĉica 2, YU-51000 RIJEKA, 17j, ler-ino, ĉt

Zoltán DUDÁS, YU-24000 SUBOTICA, Frederika Sopena 74, 19j, kripla knabo, abituriento kun samaĝaj kriplaj knabinoj, literaturo, lingvoj.

Károly BRINDZA, YU-24000 SUBOTICA, Pupinova 29 juna kamparano pri m kaj literaturo
Alexander KOZODOJ, PL 80-360 GDANSK, Str. B. Krzywostego 21/20, Pollando, 22j, kun gejunuloj 22-30j.

Malgorzata SPIZEWSKA, PL 86-300 GRUDZIADZ, ul. M. Fornalskiej 1 m.22, 18j polino, pri turismo, medicino kaj dancmuziko

Dariusz LIS, PL 14-500 BRANIEWO, ul. Wiejska 5/B/6, 17j knabo, pri naturo kaj aparte pri ornitologio. Li kolektas BK kaj pm.

Henry Koscielny, PL 42-680 STRZYBNICA, Gwardii Czerwonej 3, 23j, pri m kaj naturo.

Branislavo FRAS, PL 32-511 JAWORZNO, ul.Jasminowa 27d-48, 30j f-o, pri E-movado, turismo, geografio, fremdaj lingvoj koloraj bk.

Ryszard URBANOWICZ, PL 95-100 ZGIERZ, ul. Rewolucji 1905 r.n-ro 82/95, 19j studento de politekniko, d kor pri Esperanto-movado.

Andreo PELSZYK, PL 80-506 GDANSK Brzezno, ul. Chodkiewicza 18/48, 24j fervoja oficisto.

Kiu P.T.T.-isto (Poŝt-telefon-, telegraf-isto) interesiĝas pri kunlaboro en fondota „Fakgrupo P.T.T.“? Turnu vin al: Rolf Beau, GDR-7010 Leipzig, Jacobstr. 9.

Anna Juk, p. BOROVOJ, Uĥtinskogo r-na, Koml ASSR, ul. Stacionnaja 5-7, 17j, f-ino d kor pri libroj, m, sporto. Sovetunio.

Erhard WILKE, 171 Luckenwalde, Ludwig-Jahn Str 8, GDR, instruisto 44j, d kor. tm pri ĉt precipe pri ŝako, fremdaj lingvoj kaj literaturo.

Igorij ŜADROV, SU-335028 Sevastopol, str. Tolstogo 23, studento d kor ĉt

Andreas BRÜCKNER, GDR 133 SCHWEDT, Thälmannstr 60a, Wohng.3, 16j, d kor tm pri turismo, kol bk, pm.

Nataŝa OSTAPĈUK, SU 334007 p/o POBEDNOJE ĜANKOJSKI RAJON, Krimskoj obj., f-ino 18j, d kor pri fremdaj lingvoj

Esperanto-faro, Kulturligo de GDR, 2500 ROSTOCK 1, Kröpeliner Str.23 serĉas koresponamikoj por komencantoj.

Genadin RJABININ, SU-335003 Sevastopol, Tolstogo 18-18, studento, ĉt

Jacqueline Scherret, GDR 20 Neubrandenburg, Adlerstr.20, 13j, d kor pri sporto, literaturo, kol pm.

Natalja GIMPEL, SU-335028, str.Menŝikova 17-29, 18j, d kor, -ino

Andre HAHN, GDR 20 Neubrandenburg, Roentgenstr.6, 16j, d kor pri sporto, literaturo, kol pm bk.

Tatjna Rudek, SU 335022 Sevastopol, str. Ljotĉikov 35-67 d kor tm

Katrin Zywicki, GDR 20 Neubrandenburg, Ahornstr 3, 12j d kor kun geamikoj, kol pm bk.

Leonid TKAĈUK, 335022 Sevastopol, Str Gorpiŝĉenko 73-36, instruisto de fremdlingvoj, d kor

Volker FRANCE, GDR BURG ATARGARD, Gartenstr 23, 2002; 40j invalido d kor tm pri vojaĝoj, natur, kol pm bk

Ludmila POKAŜALOVA, SU 335016 Sevastopol, str Alexander 10, f-ino

Sylvia RÖSLER, GDR, Thammenhain, Thälmannstr 23, 18 j tm ĉt

Victor GOBULEV, 335903 BELOKAMENSE, str. Ĉetvertakova 17-3, 25j, SU

Barbara BÖHLIG, GDR 725 WURZEN, Zillestr 43, 33j, oficistino

René JÄCK, GDR 725 WURZEN, E.Weinert Str 14, 12j, ĉt, tm

Stefan KELLER, Munkasör, ut 34, H-9023 GYÖR, Hungario, juna psikopedagogo kontaktus kun infanvartistinoj, instruist(in)oj, profesor(in)oj idts pri eduksciencaj eksperimentoj, serĉas E-an aŭ naclingvan fakliteraturon de pedagogio.

Jacek SZCZEPANIK, ul. Glowna 114 PL 42-620 NAKLO SL., 19jarulo

Teresa JABLONSKA, ul.Koszczuski 5A, PL 11200 BARTOSZYCE.

Jahsek, ul. Lodzka 29, bl.13, m 5, PL 97-300 Piotrkow-TRYB, iŝ pm, bk, E-librojn, d kor tm ĉt

Kazimierz KANTOR, ul Knurówka 291, PL-41-804 ZABRZE-MACIEJOW tm ĉt

Elzbieta STANKOWSKA, ul. Norwida 18/4, PL 58-309, WALBRZYCH itŝ esperantafojn, d kor tm

Grazyna BANDURSKA, ul. Mickiewicza 35/50, PL-05-120 LEGIONOVO, tm ĉl

Leszek SPRAWA, ul.Krasiekiego 27/38 pl 85822 BYDGOSZCZ, tm ĉt

Polaj infanoj d kor kun ĉl. Adreso: Palac Młodzieży, ul Ogarna 56, GDANSK, Pollando.

Polo, 39-j, Eksedziĝinta, diplomita esp-isto, naturamiko kun multflankaj interesoj, d edziĝi al progresinta s-anino preta kunfandi E-familion kaj kune labori per kaj por E-o. Nur seriozajn ofertojn atendas Zbygniew CZUPKALLO, pl 24-220 Niedzwica Duza. Pollando.

Marta PAC, PL 80-402 GDANSK Grunia, ul. Radunska 40/8, f-ino, 26j, telegrafistino

Erika POGONOWSKA, PL 80-107 GDANSK Siedlice, ul. Malciewskiego 78E157, 34j s-ino, oficistino

Irena PRYBYLOWICZ, PL 82-200 MALBORK, ul. M.Sklodowskiej-Curie 8/6, 26j, teknikistino, s-ino

RADZANOWSKA Cecilia, PL 84-120 WLADYSLAWOWO, ul. 22 Lipca 19, Dom Rybaka Fizykoterapia, 38j, s-ino, flegistino.

Vilmos TORÓ, R-4055 COVASNA, str. Zoliro n-ro 1, Rumanio, 45j grafikisto pri itŝ de ekslibrisoj. Geanoj de rostova E-klubo volas kontaktiĝi kun iu E-klubo por kor. SU-344006 Rostovo ĉe Dono, ab.ja.1003, Tatjana Kurepina.

Novaj kursanoj (ĉefa gestudentoj) de nova E-grupo ŝatus kor kun tm *V. GRIGAR Vilnius*

Lernejo serĉas ge-amikojn el tm. Vdovin Juri, SU-656060 Barnaul, Solneĉnaja Poljana 21-294

Adas VADMINAS, SU-232056 VILNIUS, Virsuliskiy 67-57, 35j teknikisto *instruxxxx* teknikumo d kor pri turismo, literaturo, m, lingvoj.

Nadia KOGEVNIKOVA, SU-404123 VOLPSZKIJ, 11m/p.d.4.kv.24 Sovetunio 22j pionirgvidantino d kor kun samaĝul/in/oj.

20 diversaj komencantoj-esperantistoj d kor tm 626440 TJUMENSKAJA obl, SU, Niĵnevartosk, ul.M.Galila, 13, Muzeo, Kid „Esperanto“.

Eŭgenia REJMO, estonio, 202900 Viljandi, poŝterestante, 26j komerclaboristino d kor tm, kol pm, bk, insignojn.

XXXXXXXXXX

XXXXXXXX

XXXX

X

Esperantský kroužek

Klubu pracujících

CS 29501 Mnichovo Hradiště

Otevřená listovní zásilka

LIAZ 02-KP-44/Hr